

2017-01 Bonan Novan Jaron ! Nova informilo **kern.info**
Jen intervjuo kun Sean O'Riain pri la nuna stato de atomarmiloj.
La intervjuo okazis en kadre de KAEST 2016 en Modra.
<https://kern.punkto.info/2016/12/21/kp103-nukleaj-armiloj-nuntempe/>

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.
AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj troviĝas je la enirpago, krome – vidu la butonojn maldekstre ...
La teksto (kutime uzante (ch ... u) estas laŭ la dato; bonvolu serĉi temojn laŭ via intereso.

Ni ofte uzas de.wikipedia.org (au eo.wikipedia.org) kaj ili ankaŭ bezonas regulan subtenon.
BIC BFSWDE33BER
IBAN DE33 1002 0500 0001 1947 00

=====

2017-11-30 Brexit helpas eviti imposto-evitadon
La Verduloj & Regionalistoj publikis raporton „Justa impostado – grava temo por la intertraktado por Brexit“ , verkita de Claire Godfrey.
Kiel membro de EU, Granda Britio povis defendi siajn imposto-oazojn. Kiu damaĝis la eblecon de EU financi la infrastrukturon, edukadon kaj socialan bonstaton. Estonte necesas eviti tian agreseman imposto-konkurencon.
Jen la raporto en la angla, mendita de la frakcio,
<http://extranet.greens-efa-service.eu/public/media/file/1/5414>
Komento de Sven Giegold en la germana:
<http://www.sven-giegold.de/2017/brexit-steuerdumping-gehört-ins-zentrum-der-verhandlungen/>

Komento de AVE/mw: al mi ne plachas la Brexit (eliro de GB el la EU). Mi preferus ke GB restus kaj tamen oni trovos regulojn cele al justa impostado de ĉiuj firmaoj kiuj agadas ene de EU.

1986-04-26 Raporto de kuracistino pri Chernobila atom-katastrofo
Paulina Cerluk, kiu subtenis homojn ĉirkaŭ la katastrofo en Pripjat, estis intervjuita. Ŝi travivis kanceron, sed multaj kolegoj – same kiel plejmultaj de la likvidatoroj - mortis pro la laboro.
La registaro malbone kaj malfrue informis pri la katastrofo.
<http://www.deutschlandfunk.de/erinnerungen-einer-aerztin-an-tschnobyl-diese.922.de.html>

1957-10 Sellafield – radioaktiva poluado de la irlanda maro
jam de la komenco de la epoko de atom-reaktoroj okazis diversaj katastrofoj. Eĉ se ne mortis homoj tuj, sed grandaj teritorioj estis polutiaj. Kaj malfacile pruvi, se – krom leukemio - iaj malsanoj okazis pro tio. Ankaŭ la jamaj atom-rubejoj minacas. Pri tio – ekz-e en Usono - alifoje.

2017-11-22 Pli pri radioaktiva rutenio el la atom-uzino Majak
En Oktobro 2017 la rusa vetermonitara autoritato raportis pri granda poluo pere de radioaktiva Ru-106 (Rutenio) mezurita en Argajash, 30 km sude de Majak (che la urbo Osjorsk, pli frue nomita Ĉeljabinsk-40). Kio okazis oni ghis nun ne raportis. (laŭ B. Poetter, taz, p. 9)
Intertempe Detaloj en deko da lingvoj: https://de.wikipedia.org/wiki/Kerntechnische_Anlage_Majak

<http://www.spiegel.de/wissenschaft/technik/ruthenium-wolke-spuren-fuehren-zur-atomfabrik-majak-im-suerural-a-1180081.html>

Tie vi trovas videon pri la katastrofo de Majak 1957-09-29 kiam eksplodis (pro radioaktiva ĉen-reakcio) 80 tunoj da radioaktiva rubaĵo, kaj poluis grandan teritorion (ghis 400 km).
Kaj jen pliaj informoj: <http://www.20min.ch/wissen/news/story/Verschweigt-Russland-erneut-einen-Atom-Unfall--24975498>

2017-11-22 denove granda radioaktiva poluado apud Majak

1957 okazis granda eksplodo en la rusa uzino por produkti plutonion por atombomboj, apud Cheljabinsk en sud-orienta Uralo, uzino Majak (t.s. lumturo). Tiam la lago Kyshtym kaj granda teritorio estis polutita kaj la „plumo“ de tiu poluado estis transportita de la vento trans ch. 50 au 100 km. Ech nun, kiam arbaro brulas, au kiam birdoj manghas ion el la rivereto denove radioaktivaj substancoj estas movataj. Zhores Medvedev esploris kaj raportis en la 70-aj jaroj, sed la autoritato nur post da disfalo de SU.

En Oktobro 2017 la rusa vetermonitara autoritato raportis pri granda poluo pere de radioaktiva Ru-106 (Rutenio) ghis 30 km for de Majak. Kio okazis oni ne raportis.

(laŭ B. Poetter, taz, p. 9)

Detaloj en deko da lingvoj: https://de.wikipedia.org/wiki/Kerntechnische_Anlage_Majak

2017-11-19 Tutmonda tago de necesejoj

„Tutmonda celo por daurigebla evoluo“ n-o 6, de UN, ghis 2030 estas ke por chiu homo ekzistas provizo por la sanitaraj bezonoj, aparte se temas pri fekajho kaj urino.

Estas 4 pashoj:

1. ujo kiu kolektas kaj evitas malpurighon de akvo kaj aero – kaj tiel evitas kelkajn malsanojn;
2. transporto al la traktejo (akvopuriga instalajho);
3. traktado por dispartigi la akvon, kiu povas esti ellasata en riveron au lagon;
4. utiligi la restajhon por produkti energion kaj fekundenzon.

Jen la retejo kun baza teksto en la oficialaj lingvoj de UN: <http://www.worldtoiletday.info/resources/>

Komento AVE/mw:

Kompreneble la bruto-tenado ankaŭ postulas similajn solvojn. Kie okazas amasa tenado da brut-bestoj la chirkauanta tereno ne sufichas por regule dismeti la fekajhon kaj urinon al la kampoj, kaj kausus malbonigon de la grundakvo.

2017-11-01 brulantaj torfejoj ankaŭ aliloke – Hispanio/Kastilio

Ramon respondis ke ankaŭ en Hispanio brulas/-is torfejoj:

Pro troa elpreno da akvo en la regiono kie nun trovighas la Nacia Parko Tablas de Daimiel en Kastilio-La Mancha sekighis tiu granda torfejo, sekve estighis profundaj fendoj en la torfa grundo, kaj finfine la eniranta oksigeno kausis en la jaro 2010 membrulighon de la subgrunda torfo, kiu montrighis en fumanta subbrulajho.

Nur post 5 jaroj oni povis estingi la subbrulajhojn, kiam okazis intensa pluvo kaj eblis preni akvon el barlago.

(dankon al Ramon Perera)

Komento AVE/mw:

Tutmonde la troa utiligo de trinkakvo (por homoj, agrikulturo, industrio) kausas grandajn problemojn. Krome la senarbarigo kausas malpliighon da regulaj pluvoj. Sagha akvo-politiko estas bezonata por eviti militojn. La unuaj civilizoj kun skribitaj laghoj (en Mesopotamio ?) estighis pro la bezono reguligi la utiligon de la malofta resurso akvo.

2017-10-28 sekigitaj marchoj bruladas en Siberio jam pli ol 10 jarojn – les-kom mankas.

Greenpeace (verd-paco) raportis pri sia aktiveco ekstingi brulantajn marchojn en la siberia regiono Ulan Ude, oriente de la Bajkalo.

La somero estis varmega; almenau unu kauso estis ke „oni“ forgesis lasi akvon en la marchajn terenojn. Pro tio brulanta surfaco, kausas bruladon de la sekigita marco en la profundon.

Krom la perdo da torfo, ghi kausas grandan fum-nubon, kiu malbonigas la spir-aeron.

Malgrau tio ke Siberio estas ege maldense loghata, ne bonas lasi la ardo-nestojn; bedaurinde la autoritatoj rapide rezignas. Pro tio en granda tereno (300 ha) brulas multaj subgrundaj fajroj, kaj ekflamighas aliaj. Sisifus-a laboro. La specialisto diris, ke dum soveta tempo estis la arbaro-kooperativoj (au komitatoj ?) kiuj pli interesighis pri la situacio den la arbaroj.

Jen la video (6 minutoj) en la germana kaj rusa:

<https://www.tagesschau.de/ausland/russland-301.html>

2017-10-17 Katalunio – chu paca solvo eblas ?

En 6 lingvoj: Helpcatalonia.eu

Bedaurinde – kaj supozeble pro alta fiereco - Rajoy (chefministro de Hispanio) ne akceptis paroli kun Puigdemont (chefministro de la autonoma provinco Katalunio) pri ebla solvo.

Granda parto de la katalunoj jam delonge postulas pli altan autonomecon – kiun Katalunio ricevis 2006, sed jam 2010 la registara partio PP reduktis ghin. Pro tio komencis la nuna „batalo“.

Lau la konstitucio de 1978 (dum la interregno) ne eblas deklari la sendependecon.

Komento de AVE/mw: EU ja ne shatas dividon de unuopaj EU-landoj – ekz-e pro praktikaj kialoj. Sed eblas montri, ke kelkaj etaj shtatoj de EU, kiel Luksemburgo, montras ke malgrandaj nacioj ene de EU eblas. Eble iam EU ighos supershtato de la regionoj, tiam eblas doni la saman autonomion al chiuj regionoj; kondiĉe ke chiuj alpagas la samaj impostaj reguloj al la EU-financoj.

2017-10-16 Jhurnalisto Daphne Caruana Galizia en Malta murdita

Shi estis murdita pere de eksplodo de shia automobilo – la chefministro nomis tion atako.

Galicia aportis pri korupto kaj mon-lavado, kaj estis atestantino en la komisiono de la Europa Parlamento pri la t.n. „Panama Papers“, kie rilatas pri kruda eluzo de libereco kaj kashado de financoj por eviti impostojn. Krom firmaoj ankaŭ 143 altrangaj politikistoj troviĝas en tiu listo da fraudantoj.

Sven Giegold, MEP de la Verduloj, diris:

La murdo je Galicia estas atako al la demokratio. ... Malta estas „Mekka“ de mon-lavantoj kaj imposto-fraudantoj; kaj tiuj riproĉoj eĉ rilatas al la registaro.

La frakcio de la Verduloj & Regionalistoj postulis oficiale de la EU-Komisiono, inici t.n. Proceson antaŭ la Tribunalo de la Europa Unio. Ili kritikis ke socialaj kaj kristanaj demokratoj malakceptis nomigi unuopaj shtatojn kaj registarojn en la Raporto pri Panama Papers. Tiel ne eblas batali kontraŭ tiaj fraudoj.

2017-10-10 Inundoj kaj ter-glitoj en Tibeto (autonoma provinco Xi-Zang)

Pro la altigita temperaturo ankaŭ sur la tre alta regiono kie troviĝas Tibeto shanghighas la naturo, aparte rilate akvon. Pro la temperatur-altigo la daŭra frosto en kelkaj regionoj de la Himalajo perdighas; pro tio movighas la grundo, shtonaroj kaj rokoj, kiuj antaŭe estis kvazau gluitaj de la t.n. permafrostoj.

Simile okazas pli ofte kaj forte inundoj, kiuj detruas domojn kaj mortigas homojn.

Aliaj kauzoj estas la urbanizigho (parte pro politikaj kauzoj) kaj pli frue (antaŭ 20-30 jaroj) la forhakado de la montara arbaro. Pri tiu Chr. Lavarenne kaj mi verkis artikolon jam 1996

(en Esperanto kaj ĉina): www.verduloj.org/tib_senarba.htm

dank' al Prof. Chen Shenru kiu publikigis ghin:

Tutmondaj Scienco kaj Tekniko, 1996/3, p-oj 30 - 34 (cn, eo)

(germana): www.igfm-muenchen.de/tibet/diir/2017/FloodedTibet%204.9.17.html

(angla, ĉina, tibeta): www.tibet.net/2015/10/climate-change-tibet-sees-receding-glaciers-shrinking-permafrost/

1966-07-02 La unua atombombo de 193 de Francio

ankorau nun ekzistas atombomba dezerto en Franca Polinezio, aparte la insuloj Mururoa kaj Fangataufa postrestis kiel ne-irenda teritorio.

Kanceroj plioftas en la apudaj insuloj Tahiti kaj Hao.

Sed Francio rifuzas kompensi tiajn malsanojn, pagi por la kuracado, re-utiligi la grundon de la insuloj. 50 jaroj estas malmulte se temas pri nuklea poluado, tion ni lernis de Chernobil (1986), kies radioaktive shargita nuboj el-pluvis super Suda Germanio kaj parto de Francio; kie post 30 jaroj troviĝas ne-manghindaj fungoj kaj aproj.

Jen artikolo en la angla de Novzelandaj jurnalo:

www.radionz.co.nz/international/pacific-news/307804/the-battle-continues,-50-years-after-first-test-at-mururoa

jen en Esperanto dank' al HORI Jasuo „Mururoa_post_50_jaroj.pdf“.

Komento de AVE/mw:

Indas finfine aboli la atombombojn entute, kaj „purigi“ chiujn poluitajn lokojn.

Necesas apliki la spertojn el la Ludo-teorio – evoluita ankaŭ de samideano Reinhard Selten – por konvinki la posedantojn de atombomboj rezigni pri tia armilo.

2017-09-29 Travidebla Lobiado / Monsanto bremsata / Glyphosat / glifosato /

Monsanto estas la ĉefa produktanto de glifosato. Kaj ili influas kashe politikistojn por daŭrigi la permeson apliki ĉi-tiun dangheran kontraŭ homoj kaj biodiverseco herbicido. Bedaurinde la EU-komisiono ne volis kompreni kiom glifosato minacas la naturon kaj la homojn, kaj atendas al la naciaj ministroj ĉu daŭrigi la permeson ĉu ne. Bedaurinde en Germanio ghis nun mankis forta kontraŭo; felice Francio decidis kontraŭi la aplikon de glifosato.

En Austrio CSO (civil-socia organizajho) kolektas subskribojn por diri „ni ne volas glifosaton“ al la parlamentanoj – jen: <https://www.global2000.at/glyphosat>

La Federacia Instituto pri Takso de Riskoj (BfR) en Germanio simple kopiis de Monsanto la takson pri la riskoj: www.umweltinstitut.org/aktuelle-meldungen/meldungen/glyphosat-behoerde-schreibt-bewertung-von-monsanto-ab.html

La Verdaj Europarlamentanoj delonge instigis regulojn por pli travidebla lobiado; sed Monsanto ne akceptis ghin; ne volis partopreni la parlamentan pridiskutadon de la „Monsanto Papers“.

Pro tio, kiel unua firmao iliaj lobiistoj ne plu rajtas eniri la parlamentejon (por influi la parlamentanojn).

Sven Giegold (EP, Verduloj kaj Regionalistoj)) raportis pri tio (en la angla kaj germana)

<http://www.sven-giegold.de/2017/monsanto-is-excluded-from-lobbying-access-to-the-eu-parliament/>

<http://www.sven-giegold.de/2017/monsanto-wird-lobbyzugang-zum-eu-parlament-entzogen/>

Komento de AVE/mw: Ni esperas, ke finfine la EU-Komisionano Andriukaitis malpermesos la aplikon de glifosat, ghis vere neutrala pruvo ekzistos kiu garantias ke glifosat ne estas danghera kontraŭ naturo kaj homaro – lau la principo de antaŭ-zorgo. Ni supozas, ke tia pruvo ne troveblas.

2017-09-03 Tanzanio: Protestoj kontraŭ uranio-fabriko de ROSATOM

Jen ligilo al NRO/CSO en Tanzanio: www.cesopetz.org/

2017-08 Sunenergio kaj Lignokarbo – por kuiri kaj por plibonigi la grundon

Che www.agrokarbo.info vi trovos informojn kiel utiligi karbon el plantomaterialo por plibonigi la grundon.

Tie ankaŭ videblas informo pri pli efikaj fornoj: www.agrokarbo.info/energiesparherd-glow-im-test/

Se volas scii pli pri tiu tekniko bonvolu demandi Roland Schnell: <esperanto@berlin.de>

Eble iu konas ATE, Asocio de Terkultivistoj Esperantistaj – ghis nun mi trovis ilin nur sur Fejzbuk – sed tie mi ne volas registri.

Jen pagho kun pluraj aplikoj kaj ligiloj pri sun-varmo: www.hc-solar.de/

ULOG Freiburg informas pri la tekniko, kuiri per sunenergio: www.suninside.de/

2017-08 Ovoj kun Fipronil – chu la detruo de milionoj da ovoj necesis ?

Chiukaze Fipronil – kontraŭ akaroj - estas entute malpermesita se temas pri nutrajho-produktado.

Tio signifas, ke en ovoj ghi ne rajtas aperi.

Ghi tamen aperis, kaj finfine oni trovis la pesticidon en Germanio – en ovoj el Belgio kaj Nederlando, kie Fipronil estas permesata.

Lau aktuala informo infano povus manghi chiutage unu ovon de tiaj ovoj (sed ne pli), sen danghero.

Ghi ankaŭ endangherigas abelojn se oni uzas ghin por grensemo-disinfektado.

Pro tio oni limigis la permeson uzi ghin por agrikulturo en EU ghis la jaro 2018.

(lau de.wikipedia.org , bedaŭrinde ne en Esperanto).

2017-08-06 Insektoj formortas pli kaj pli - Lobiado por Glifosat kashas la problemon

Same kiel por atomenergio, necesas ankaŭ plibeligi la problemojn kiujn kausas la pesticidoj.

Pri Glyphosat (herbicido) mi raportis plurfoje – vidu [umweltinstitut.org](http://www.umweltinstitut.org) .

Pri Neonicotinoid-oj (grupo da insekticidoj) necesas diri ke ili endangherigas abelojn kaj similajn insektojn. Tre

detale raportas la Pestizid-Aktion-Netzwerk, jen listo en la angla pri la plej dangheraj:

http://www.pan-germany.org/download/PAN_HHP_List_161212_F.pdf

La grava afero estas la la industrio kaj industria agrikulturo profitas de tiaj pesticidoj, pro tio ili klopodas kashi la problemojn – tiamaniere:

- elvoki dubojn pri la faritaj neutralaj studoj

- elvoki dubojn pri la motivoj de la sciencistoj kaj kontraŭuloj

Jen informo pri tio de sud-rejna regiona grupo de Amikoj de la Tero (BUND):

<http://www.bund-rvso.de/insektensterben-luege-kein-.html>

2017-08-03 Arbo-Festo okaze de la Nacia Tago en Nigerlando – prezidento ankaŭ plantas arbon
"Unu persono, unu arbo" estas la nomo de nia kuranta festo.
(Iliasou Boukari sendis foton)

1977-02-22 **Bohunice A1 – Slovakio -fandigo de la nukleaj brulstabo**

pro tro hasta laboro – kauxata de fiksdato de la komunista partio – okazis tiu fandigo kiu detruis la atomreaktoron A1. Oni planis plene malkonstrui kaj purigi la lokon ghis 2033 – sed tiom „rapide“ ne eblas. 1991 okazis akcidento je tiuj laboroj, kiuj kauxis radioakvian poluadon de la grundakvo chirkaue. Sekve de tiuj kontinuaj problemoj Slovakio devas elspezi multe pli.

Same ili ne sukcesas lau-plane finkonstrui la 2 lastajn reaktorojn Mohovce III kaj IV – kio ankaŭ kostadas. Tamen Slovakio produktas 54% de la kurento el atomreaktoroj. Supozeble investo en alternativojn estus malpli kosta kaj danghera. Artikolo kun pluraj detaloj en LMD (Manfred Kriener, germana eldono): 2017-06-18, au:
www.hans-josef-fell.de/content/index.php/dokumente/weitere-themenbereiche/939-atomruine-a1-der-vergessene-reaktorunfall-von-bohunice/file

2017-05 Raportoj pri Fukushima ktp.

HORI Jasuo regule sendis raportojn pri la sekvoj de la nuklea katastrofo de Fukushima.

Kaj Ginette MARTIN tradukis ilin en la francan. La komencaj artikoloj trovighas sur la retejoo de SAT. Kaj nun ili trovighas tie:

www.esperanto-indre.com (serchu „Japon“ alklaku dekstre: chez nos voisins/ nouvelles du japon

www.fukushima-blog.com (HORI Jasuo havas specialan rubrikon supre, en rugxa koloro)

Sur la du retejoj, la tekstoj aperas en ambaŭ lingvoj, franca kaj esperanta, cxu rekte legebla, cxu per ligo alklakebla. Fukushima-blog estas tre inform-ricxa retejo, ankaŭ donas tekstojn en la angla, kiam eblas.

(dankon al Ginette)

2017-07-11 EU-Komisiono volas permesi Glyphosat-on dum pluraj 10 jaroj

Nekredeble, tion ili celas malgrau raportoj pri plurflanka damagho al la sano (i.a. potencialo krei kanceron) kaj ekologio (biodiverseco de la grunda vivantajho) la EU-Komisiono ne auskultas la diversajn riprochojn de fakuloj, kaj neglektas la ECI, kiu en rekorda tempo kolektis pli ol milionon da subskriboj kontraŭ tia permeso.

La antaŭzorga principo postulas unue studi la aferon surbaze ne sendependaj studoj, antaŭ tiom longdaŭra permeso. Glifosat intertempe trovighas ne nur en la biero, sed ankaŭ en nia urino (kiun ni ja ne trinkas, sed ankaŭ montras la dangheran potencialon). Mi ne komprenas, kiel kuracisto la EU-Komisaro pri sano kaj nutrajho-sekureco, (kaj esperantisto) Andriukaitis, povas permesi tian atakon sur la vivosfero.

(lau: Badische Zeitung 2017-07-11)

2017-06-16 ECI kontraŭ glifosat atingis 1 millionon – ni esperas profundan pripenson

Koran dankon al vi chiuj kiuj subtenis* chi-tiun European Civitanan Iniciativon, kiu jhus atingis la bezonatan nombron de 1 miliono da subskriboj.

Aparte interesa fakto estas ke **la respondeca EU-komisaro pri sano kaj nutrajha-sekureco**, la kuracisto **D-ro Vytenis Andriukaitis**, **estas fervora esperantisto**.

Li jhus prelegis okaze de la EEU-kongreso en Friburgo/Brigovio pri „Zamenhof – antaŭulo de Homaj Rajtoj“ - jes, ankaŭ nutrajh-sekureco apartenas al la tiuj rajtoj, ke la registaroj administras kion oni devas malpermesi.

Bedaurinde EFSA ne montris la necesan rigoron kontraŭ la agro-industrio (Monsanto, ktp.).

pro tio mi skribis al li, kaj kunsendis detalan leteron de usona kuracisto kiu petis lin unue trakribi la industriajn dokumentojn detale. Kompreneble EFSA kiu respondecas pri la sano de 500 milionoj da homoj (kaj ankaŭ pri la biodiverseco en EU) devus mem kaj sendepende de la lobiistoj esplori la efikojn de tiom gravaj produktoojn, kiel glifosat. Mi ja scias, ke la kampanoj tre shatas chi-tiun miraklan herbicidon – sed mi ankaŭ rememoras le libron „Silenta Printempo – Silent Spring“ - kiu avertis pri la damaghoj de DDT, k.s. - kaj im pli poste la respondeculojn malpermesis uzi tiajn ghenerale (krom kelkaj esceptoj).

Do, ni esperas profundan pripenson flanke de D-ro Andriukaitis kaj liaj specialistoj - kiomgrade la apliko de Glyphosat estas respondec-inda.

*) kompreneble nur EU-civitanoj rajtis subskribi; tamen gravas ankaŭ por la tuta mondo.

2017-06 protekti arbustojn, arbojn kaj arbarojn – chie ajn – aparte en la duonsekaj regionoj.

Rainforest-Song: <https://www.youtube.com/watch?v=gBgV75NQRlQ>

ghis nun en la angla – montras la valoron de la pluvarbaroj

Farmer Managed Natural Regeneration FMNR (kampanoj mastrumas la naturan regeneradon de arboj) – finfine re-verdigas dezertigitan regionon: <http://fmnrhub.com.au/projects/niger/#.WTfoKmekKUK>

Jen CSO kiu subtenas la evoluon de sube, kaj aplikas la metodon FMNR: World Vision International (en): www.wvi.org/niger , (koran dankon al Roland Schnell)

2017-06-09 denove & **urghe: ECI kontraŭ Glifosat (europa civitana iniciativo):**

Mi sendis la alvokon jam en Februaro – nun la pagharo uzas 8 lingvojn.

Komuna agado de multaj ekologiaj organizajhoj kun la celo malpermesi uzi Glifosat-on (Gylphosat)

La kolekto de subskriboj finos en Junio – se mi bone komprenis.

Se vi sendos papere, necesas sendi ene de 6 tagoj !!

Aktuale la ECI uzas 8 lingvojn – la retejo: Bonvolu subskribi: Stopglyphosate.org

ECI postulas de la Europa Komisiono reagi kaj denove pripensi – se vi estas civitano de EU (inkluzive de Britio) kaj ankoraŭ ne subskribis bonvolu fari nun.

Glifosat ne nur detruas t.n. trud-herbojn, ghi ankaŭ – komune kun kelkaj insekticidoj – ke ne nur reduktighas la kvanta da trudherboj, kvanta da insektoj, sed ankaŭ la kvanton da birdoj.

Glifosat ebligas monokulturon en gigantaj areoj – industria uzo de la grundo (pro tio kolapsas la biodiverseco !!).

Finfine ankaŭ la homo apartenas al tiu reto de vivantajho – chu ne ?

Se oni veturas per automobilo, oni trovas chiam malpli da papilioj k.a. insektoj sur la auto-fenestro.

Pli pri tio ankaŭ che: Umweltinstitut.org (de, en)

Friends of the Earth: foei.org (en pluraj lingvoj)

2017-05-15 Bestoj havas animon – kelkaj homoj ne akceptas tiun opinionon.

Anima Naturalis estas asocio por defendi la rajtojn de la bestoj.

La 29an de aprilo 2016 du membroj de asocio en hispan-lingvaj regionoj, AnimaNaturalis, kiuj filmis taŭrobatalon, estis atakitaj de tri personoj – kiuj poste konfesis ke ili diskriminaciis/agis pro ideoj - en la kataluna urbo Mas de Barberans: de.wikipedia.org/wiki/AnimaNaturalis

Hodiaŭ (2017-05-15) okazis la juĝo kontraŭ la tri atakintoj. Ili estis kondamnitaj entute al monpuno de 8.010 eŭroj kaj kompenso (ch. 1.600) pro la deliktoj trudoj, korpaj kaj materiaj damaĝoj.

www.vilaweb.cat/noticies/els-agressors-de-les-animales-del-mas-de-barberans-accepten-multes-dun-total-de-8-000-euros-per-evitar-el-judici-3/

2017-05-15 Tauro-batalo, troa konsumoda lakto-produktoj kaj viando - kaj nia natura pejzagho

Komento de AVE/mw: Se oni volas manghi ovojn kaj trinki lakton, manghi fromagho oni finfine mortigas bestojn,

char lakto-produktoj devenas el sistemo, kie oni devas mortigi bovojn kaj manghi - char bovino nur donas lakton,

kiam shi chiujure naskas bebon. La hauto – por produkti ledon – kutime estas flanka produkto de tiu sistemo. Se

oni rezignus pri intensa bruto-tenado, oni povus uzi nur tre malmulte da tiaj produktoj. Ankaŭ por nia pejzagho

helpas bovoj, shafoj, kaproj, char ili tenas malferman pejzagho kun la rilata biodiverseco de flauro kaj fauno.

Alia afero estas la postulo, se temas pri la tauro-batalo, masakro da elefantoj ktp. pro la kornoj, teni la brutaron amase kiel materialo en kaghoj kaj staloj, same ekz-e amasa buchado da fokoj por havi la pelton - kaj eviti ke ili manghas tro da fishoj - do, chi-kaze temas pri konkurenco.

Rilata kun la industria agrikulturo kaj amasa tenado da bruto-bestoj venas la temo troa fekundigo de la chirkaua natur-medio: ilia fekajho kaj urino finfine damaghas nian akvo-sistemon: de nitrato en grundakvo kaj en la lagoj kaj maroj, kie kelkaj algoj ekfloras amase, produktas venenojn, ktp.

2017-05-01 **Klimatoshanghigo en la Arkto kaj la norda hemisfero (duon-globo):**

filmeto en kiu multaj sciencistoj koncize raportas pri

- pli ekstremaj veteroj pro la alta ventego kiu kurbighas kiel ondo

- nigriĝo de la neghosurfaco

- fandigho de permafrost (t.n. eterna frostoj en la nordaj regionoj, kiu plivarmighas

http://www.sonnenseite.com/de/wissenschaft/arktisschmelze-wird-doppelt-so-schlimm.html?utm_source=%3A%3A%20Sonnenseite%20Newsletter%2029.%20April%202017%20%3A%3A&utm_medium=E-Mail&utm_campaign=Newsletter

2017-05 IAEO Monda Organizajho pri Atom-Energio en Vieno

Certe vi scias pri kontrakto inter IAEO kaj Monda Organizo pri Sano.

tio ne devus aperi publike, tamen multaj homoj nun scias kaj protestas kontraŭ tiu sekreta kontrakto.

Pro tio oni ne miras, ke la nombroj da viktimoj ĉe Chernobilo aŭ Fukushima estas malalta, kompare kun aliaj raportoj – ekz-e de IPPNW (tiu artikolo ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto)

<https://de.wikipedia.org/wiki/IPPNW>

En eo.wikipedia.org vi trovos la detalojn pri tiu kontrakto:

eo.wikipedia.org/wiki/Monda_Organiza%C4%B5o_pri_Sano#IAEA_-_Interkonsento_MOS_12-40

(dankon al Mirejo por rememori al tiu malbona afero)

2017-04-30 **EURATOM – atomenergi/milita-dinosauro de Europo-Unio**

Hans-Josef Fell prelegis en Freiburg/Breisgau pri la propagando favore al atomenergio, kiu delonge uzas falsigitajn informojn (en: Fake News); kashinte la riskojn, kaj kashinte, ke post la slogano „Atomoj por Paco“ staras la intereso produkti materialon por atombomboj.

Oni scias ke EURATOM apartenas al la kontraktoj de Romo el la jaro 1957, kaj estas unu el la bazaj partoj de la kontrakto de Lisabono, la kvazua konstitucio de Europa Unio. Sekve de tio oni diras, ke neniu membroshtato de EU povas eliri el tiu kontrakto, eĉ se la lando ne subskribis al EURATOM, kaj nek volas uzi atomenergion, nek volas uzi atombombon, ekz-e kiel Aŭstrio.

Tiu kontrakto postulas ke la membroshtatoj subtenu la esploron favore al atomenergio, kaj subtenu produkti la bezonatan materialon, konstrui atomreaktorojn; la esploro pri la temo medicino kaj sekureco (interna kaj eksterna). Ĉi-riate temas ankaŭ pri materialo por atombomboj, eĉ se tio ne estas temo; la Aneksio II de EURATOM (ene de la EU-konstitucio) entenas „Nukleaj reaktoroj de ĉiaj tipoj kaj por ĉia apliko“ - tio signifas, ke ankaŭ la „bredado“ da materialo por atombomboj estas entenata. Tiu kontrakto neglektas alternativajn energiojn (akvo- kaj vento-energio dum 1952 jam ekzistis), sekve de tio multaj miljardejoj fluadas en la atomenergion, sed nur kelkaj milionoj por evolui la alternativojn.

En 2007-02-28 la germana Verda Partio (Bündnis 90 / Die Grünen) publikigis rezulton de mendita esploro: ĉu EU-membroshtato rajtas malalighi (forlasi) la EURATOM kontrakton, kaj tamen resti membro de EU.

Fonto-indiko:

<https://www.hans-josef-fell.de/content/index.php/dokumente/studien-und-analysen/915-euratom-gutachten-im-auftrag-buendnis-90-die-gruenen-bundestagsfraktion-2007/file>

Komento AVE/mw: alternative oni povus shanghi la kontrakton kaj koncentri nur al sekurecaj kaj medicinaj temoj, kaj elmeti la subtenon por atomenergio - vidu la Rezolucion de Linz

2017-04-26 **Abolicii EURATOM-kontrakton – tuj – aŭ amendi ĝin (Rezolucio de Linz):**

Tion postulis partoprenantoj de konferenco en Linz (Aŭ). Se ne eblas en oficiala konferenco de la kontrakto-shtatoj (ene de 2 jaroj) elmeti la subtenon por evolui atomenergion, tiam ili postulas de tiuj registaroj kiuj ne uzas atomenergion malalighi de EURATOM. Fonto-indiko:

www.hans-josef-fell.de/content/index.php/presse-mainmenu-49/schlagzeilen-mainmenu-73/1086-euratom-abschaffen

2017-04-30 Grava malvenko por atomenergio en Sudafriko:

kortumo en Kaburbo jugxis la 27an de aprilo ke la registaro kontraŭlegxe decidis, ke novaj atomcentraloj estas bezonataj; plue ke la registaro agis sekrete (kaj do kontraŭlegxe) kiam ĝi faris kontraktojn por kunlaboro pri atomenergio kun Rusio, Usono kaj Suda Koreio. Sekve, la kortumo jugxis ke tiuj kontraktoj samkiel la decido investi en atomenergio

<https://www.hans-josef-fell.de/content/index.php/presse-mainmenu-49/schlagzeilen-mainmenu-73/1086-euratom-abschaffen>rgion estu nuligitaj. Du NRO-oj plendantaj al la kortumo do venkis en la afero, temas pri la mediocentro de la Sudafrika Relligia Koalicio unuflanke, kaj Earthlife Africa aliaflanke. (Amike, Harro)

2017-04-30 **Torio-Atomreaktoro – plivastighos la atombombon**

En Septembro 2016 AVENO entenis artikolon pri nova tipo de pli sekura atomreaktoro, kiu ne povas eksplodi (la nuntempa informo !). Sed estas diferenco inter interna sekureco kaj eksterna. Ĉar tiu reaktoro estas „pli simple“, ĝi povus esti utiligata en multaj landoj. Kaj de tio venas la risko, ke oni povas iomete shanghi la teknikon, kaj tiel oni povas produkti atombombon; la t.n. proliferado. Pri tio mi audis prelegon de Attac-ano.

2016-09-21 **Torio-Atomreaktoro – chu pli sekure ?**

Jen nova filmo (98 min) de Europa TV „arte“ - kiu (tro) bele priskribas la evoluon de atomenergio kaj aparte tiu de torio-atomreaktoro. Torio estas trovebla en sufiĉe granda kvanto tutmonde; nuntempe ĝi estas kvazau rubo, je ekspluatado de kelkaj Raraj Teroj, kiel Neodym (uzata por permanentaj magnetoj).

Lau fiziko ĝi estus de si mem sekura, kaj oni konstruus malgradajn energi-centralojn kies ab-varmo oni povus uzi por industrio au en malvarmaj regionoj – sonas bele. Jen la ligilo al la filmo:

(de) <http://future.arte.tv/de/thorium>

(fr) <http://future.arte.tv/fr/thorium>

Aliflanke restas la riskoj terorismo kaj plimultigo de ŝtatoj kun atombombo, jen la ligilo en la germana:

www.bund-rvso.de/thorium-reaktor-fluessigsalz-klein.html

Konciza informo:

Bele aspektas - *se oni rajtas diri tiun vorton*, se temas pri la *duobla katastrofo de Fukushima (2011-03-11 ktp.)*

broŝuro kiu entenas Hajku-ojn (japanajn koncizegajn poemojn) pri la montritaj bonegaj fotoj;

akompanante kun klarigaj tekstoj (eseetoj) pri tiuj fotoj.

La Hajkojn verkis TERUI Midori; kaj HORI Jasuo verkis la klarigajn eseetojn kaj tradukis en Esperanton.

La broŝuro estas du-lingva (jp, eo) kun plachaj kovrilpaĝoj kaj 32 paĝoj en formato A4.

La prezo modesta: 500 YEN, au 5 Euroj, havebla ĉe la UEA-libroservo. ISBN 978-4-939088-32-2

HORI Jasuo regule raportas en Esperanto el kaj pri la regiono de Fukushima, la arkivo pri tiuj raportoj ĝhis 2013

trovighas ĉe SAT: <http://satesperanto.org/-Taglibro-de-nia-Kamarado-Yasuo-.html>

2017-04-12 LED lumoj estas energie-efikaj, sed necesas pri-sanaj pripensoj

Dum la Tutmonda Kongreso de Verdularo Marteno prezentis informilon pri la flankaj efikoj de LED-lumoj al la okuloj kaj la "animo".

Unu afero estas ke la blua lumoj estas pli energie, fokusighas je malpli granda distanco de la lenso, kaj tre forta lumoj minacas la okulsanon. Krome ĝi ghenas la tag-nokotan ritmon, ĉar la blua lumoj (en hela tago au tre hela lampo) reduktas melatonin - la dormo-hormono. Pro tio oni konsilas, uzi miksitajn lumojn (varm-blankajn lumojn), vespere eviti la bluan lumojn. (laŭ Bad. Ztg. 2017-04-12, p.17) Detala raporto (de):

www.fastvoice.net/2016/03/05/schweizer-studie-keine-blaulicht-gefahr-bei-ueblichen-led-leuchtmitteln/

2017-04-14 Bonvolu subteni: medio-afablan reformon de la EU-agrarpolitiko

Nuntempe la financa subtenado de agrikulturistoj bazigas ĉefe sur la areo, sed ne al la maniero kiel oni laboras.

Tiu iniciativo (ĝhis la 2-a de Majo) postlas al EU shanghi la financadon al medio-afabla agrikulturo.

La Verduloj en la EU-Parlamento delonge petas la saman, kaj ricevis nur etan shanghon. Ĝis antaŭe mi informis pri la ECI kontraŭ glifosato, kiu estas nur unu faceto de tiu problemaro. Jen kion komentis Ramon:

Mi estas filo de terkulturista familio. Kiam mi estis 15-jaraĝa, do antaŭ 52 jaroj, mi ŝokiĝis kiam mi legis la etiketojn de la kemiaĵoj uzitaj de mia patro por 'protekti' la fruktarojn. Tiam komenciĝis mia engaĝiĝo pri ekologio. Amike, Ramon

Jen la baza pagharo – en 18-lingvoj (bonvolu klaki al: Agadu):

<https://www.living-land.org/>

2017-03-11 **Japanio 6 jaroj post la katastrofo de Fukushima**

6 jaroj post Fukushima (2011-03-11) kaj multe pli post Chernobyl (1986-04-26) kaj Harrisburg (1979) Cheljabinsk (1956) kaj multaj malpli grandaj preskaŭ-katastrofoj ni vidas ke daŭros jardekojn kaj miliardojn da EUR ĝhis la radioaktiva centro de la katastrofo povas esti sekurigata kaj la radioaktiva rubaĵo eterne (espereble sekure) kashita. Intertempe la homoj kiuj devis fugi, vivas en ne-certa situacio.

Japanio ĝis finis la leĝon pri la subteno de la fughintoj, kiuj praktike perdis sian domon kaj viv-bazon; krome oni altigis la lim-valoron kiu determinas ĉu tereno estas sekura au ne.

Nun roboto sukcesis eniri la reaktor-domon de bloko 1 (entute detruitaj estis 3, kaj malshaltitaj la aliaj 3), kaj tie

mezuris gigantan radiadon de ch. 560 Sv/h. Tie homo ene de 1 minuto mortus, la roboto ankau ne eltenis la radiadon kaj restis tie.

Info: de.wikipedia.org/wiki/Chronik_der_Nuklearkatastrophe_von_Fukushima#2017

2017-03 **Espero por atomenergio ankoraŭ vivas**

kelkaj registaroj opinias, ke tiaj atomkatastrofoj estas esceptoj. Ili preferas konstruigi novajn reaktorojn. Inter ili la plej aktivaj Rusio kaj Ĉinio, krome Britio (kReun china investo), Hungario kaj Turkio kun rusa investo, ktp.

Info: eo.wikipedia.org/wiki/Nuklea_energio_la%C5%AD_lando

2017-02-19 **Radioaktiva rubaĵo – ĉu ne uzi por konstrui domojn kaj stratojn ?**

En multaj landoj kiuj uzas atomenergion, au en kiuj oni ekspluatas uranion (!) amasiĝas la rubaĵo kun malalta radioaktiveco. Ekzemple en **Fukushima** oni permesis uzi radioaktivan rubaĵon por fundamentoj kaj sub stratoj. Dum la lastaj 5 jaroj oni uzis 350.000 kg kontaminita kun Cezio-137 kiu enhavis ĝhis 3000 Bq/kg. Kutime oni limigas tion al 100 Bq/kg.

La normala kvanto en la grundo estas 1 - 3 Bq/kg, deveninte el la atombombaj (prov-)eksplodoj !

En Japanio la shtato permesis en Junio 2016 „eksperimente“ en Minamiasota ĝhis 8000 Bq/kg; sed devis redukti ĝhin pro protestoj de la civitanoj kaj de la NRA (nacia aŭtoritato por reguligi atomenergion), kiu postulas redukti la lim-valoron al 100.

Spertoj pri sekvanta medio-kontaminado kaj rilataj malsanoj en Germanio (AG Wismut) au en Kanado, Hindio kaj Niger, kie oni ekspluatas uranion montras ke tia rubaĵo kaj polvoj aperos en la medio.

Tiu germanlingva fonto ankau montras anglalingvajjn originalajn fontojn:

http://www.sonnenseite.com/de/umwelt/strahlenmuell-im-strassenbau-umstrittene-experimente-in-fukushima.html?utm_source=%3A%3A%20Sonnenseite%20Newsletter%2018.%20Februar%202017%20%3A%3A&utm_medium=E-Mail&utm_campaign=Newsletter

2017-02-19 **Humuso kolektas CO2**

Kultivi la agrojn tiel (uzante Permakulturon, Terra Preta ktp.) ke la humuso-kvanto altighas reduktos la altighon da CO2 en la aero. Tiel oni ankau altigas la biodiversecon en la grundo.

Aliflanke la industria agrikulturo altigas la erosion kaj dekomponas la humuson – eligante CO2.

Jen pri nova libro en la germana: www.oekom.de/fileadmin/user_upload/Manifest_Die_Humusrevolution.pdf

Se vi serĉas en eo.wikipedia.org pri „humuso“ vi trovas koncizan tekston en Esperanto, kaj de tie trovas espereble pli detalan en via lingvo.

2017-02 **Malkonstruo de atomreaktoroj estas multekosta heredajho**

En Francio, oni nur komencas pripensi pri tio; EDF estas shtata, kaj oni kalkulas 40 miliardojn ĝhis 2100 – supozeble ne sufichos. Ni vidos.

Francio krome permesos al si la lukson de atombomba armilaro, kiu ankau bezonos malkonstruon.

En Germanio oni ĵhus dividis la shargon inter la privata atomcentraloj kaj la shtato: la firmaoj pagos ch. 36 miliardoj al shtata fonduso, kaj la finan riskon portos la shtato, do, la imposto-pagontoj.

(lau informoj pri:

Francio: <http://www.sonnenseite.com/de/politik/frankreich-holt-die-frage-nach-akw-rueckbau-ein.html>

Germanio kaj aliaj: https://de.wikipedia.org/wiki/Endlager_%28Kerntechnik%29)

2017-02 **Fukushima: rigardo super la nuklea fandajho – 530 Sievert !!**

En 2012 oni mezuris 73 Sievert (Sv) je eksplodita atomreaktoro de Fukushima DaiIchi.

Homo riskas radio-damaghojn, jam se eksponita al 1 Sv dum mallonga tempo (bedaurinde ne tre preciza informo). Sievert montras la kompletan radioaktivan shargon al homoj.

Ekz-e homo en Germanio estas sharghita de 2,1 mSv (milli-Sievert) dum unu jaro, el la ĉirkauajho.

La jara limvaloro por laboristo en atomreaktoro estas 20 milliSievert (mSv).

Ĝhis la naskiĝo (do, dum 9 monatoj) la tolerebla limvaloro por bebo estas 1 mSv.

La unuan fojon (post la eksplodo 2011-03-11) robota mezurilo sukcesis foti la fandajhon de la atom-nuklea „brul“-

materialo. Kaj mezuris 530 Sv ! Multajn metrojn super la fandajho.
Intertempe oni kalkulas la kostojn „purigi kaj sen-zorgigi“ al 177 miliardoj Euro !
www.energiezukunft.eu/ueber-den-tellerrand/fukushima-hoehste-strahlung-seit-kernschmelze-gemessen-gn104553/
Detaloj pri la katastrofo en multaj lingvoj:
https://de.wikipedia.org/wiki/Nuklearkatastrophe_von_Fukushima

2017-01-21 **Bonvolu protesti kontraŭ GMO-kulturoj en Eŭropo:**

Je la 27-a de Januaro okazos voĉdono en la konstanta komitato SCOPAFF de EU (pri plantoj, bestoj, furaghoj kaj nutraĵoj) pri la permeso daŭrigi la agrikulturon de GMO-maizo MON-810 (de Monsanto) kaj la unua permeso de BT-11 (Syngenta) kaj TC-1507 (Dupont). Ni kontraŭas, ĉar la riskoj (pri ili ekzistas raportoj) estas ne sufiĉe neutrale esploritaj.

Maria Heubuch, MEP de la frakcio Verduloj/Regionalistoj, (kampanarino), informis pri kampanjo sendi mesaĝojn al la koncernaj ministroj.

Do, je tiu-ĉi ret-ligo vi povos alklaki la butonon de la ministro de via propra EU-lando; kaj trovos proponon por retan au facebook-an mesaĝon kune kun ties adreso. Kompreneble vi rajtas amendi la proponitan mesaĝon.

Bonvolu sendi vian mesaĝon antaŭ la 27-a de Januaro:

<http://greens-efa-service.eu/nogmo/de/#action>

2017-01 **Dezertigo pro forhakitaj arbaroj, (ankau) en DR Kongo**

Mi vivas en Suda-Kivuo, en Uvira Teritorio.

Pri senarbarigitaj montoj, antaŭe lau la historio, niaj montaroj havis naturarbarojn sed nun pro la translokigo de loĝantoj kaj malriĉeco, la gehomoj komencis tranchi la arbojn por havighi lignokarbojn, lignokonstruaĵojn kaj lignokuirejojn. Nun la naturarbaroj ne plu ekzistas.

Konsekvenco:

1. la vetero au klimato varmighas ĉar ne sufiĉe pluvas;
2. se malmulte pluvas, la riveroj sekighas kaj estas granda manko da akvo, pro tio la kultivantoj ne plugas.
3. kaj finfine, estas granda malsato en nia regiono.

Ni kiel ekologiistoj, ni informis homojn kiamaniere ni povas zorgi por protekti nian ekologion. Tio ne sufiĉas, tial necesus kunlabori kaj fari konkretajn aktivecojn semante arbojn vilaghe kaj regione.

Koncize, tiele ni planas labori. (de Martin, fadhilienzomartin202 (che) gmail.com)

2016-12-25 **Biciklo el unupeca drato** – vere ekologi-afabla movighemo – kaj prezento:

Bruno Robineau, kiu kun Maryvonne subtenas kaj kolektas la monon por Mazingira en Francio ofertas:

Eble vi scias ke ni faris mondvojaĝon dum 8 jaroj. Ni verkis libron france kaj esperantligve (“Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo” havebla de UEA aŭ ĉe ni) :

<http://www.voyage-tourdu monde.com/nia-vojago-en-esperanto.html>

Mi faras bicikletojn mane per unu sola drato, 20 malsimilaj.

Jen aparte por esperantistoj : <http://velo-du-bonheur.com/produit/biciklo-esperanto/?lang=eo>

Salutas vin amike, Bruno ROBINEAU

Adreso: Le Moulin Boireau, Landemont, FR-49270 L’Orée d’Anjou

2016-12-19 **Metano (CH₄) kaj Karbondioksido (CO₂) aflikas la klimaton**

La kvanto da Metano en la atmosfero altiĝis ekde 1750 de 0,6 al 1,8 ppm; sed ĝi agas 5-foje pli efike ol CO₂ varmigan la klimaton. Do, oni ne plu rajtas neglekti antropogenajn (hom-kaŭzatajn) emisiojn de CH₄, malgraŭ tio ke CO₂ intertempe altiĝis al 400 ppm.

Earth Syst. Sci. Data, 8, 697–751, 2016; www.earth-syst-sci-data.net/8/697/2016

2016-12-06 **La 7-era vojo al Daurigebla Estonteco**

Caroline kunmetis la aktualajn plej-bonajn metodojn de ekologia ekonomio, en plena respekto al la alia vivantaro, kaj al la estonta vivantaro. Do, ne tro-uzi kaj ne el-ĉerpi la diversajn resursojn.

Shi opinis ke indus meti tiujn informojn sur la retejon de AVE; tion ni faras, kaj vi trovos la ligilojn, uzante la butonon „Ligoj“ ĉe <http://verduloj.org/ligoj.htm>

Bedaurinde la tekstoj estas en la angla, kaj ĝenerale temas pri Usono – ofte kun internaciaj ligoj:

Rikolti la energion de la suno – kompleta gvidilo:

<http://www.improvenet.com/a/harness-the-power-of-the-sun-the-complete-guide-to-using-solar-energy>

Fotovoltaiko por la propraj domoj:

<http://www.homeadvisor.com/r/home-solar-panels/>

Komposti en ghardenoj – plibonigi la grundon:

<http://www.planetnatural.com/composting-101/>

Konsiloj por ekologie afablaj klas-chambroj (kaj ankaŭ oficejoj) en 24 eblecoj:

<https://www.populationeducation.org/content/24-ways-make-your-classroom-eco-friendly-year>

Studentaj praktikaj staghoj pri ekologio kaj medio-protekto, tie vi trovos ankaŭ subtenantojn (scholarships):

<http://www.fastweb.com/college-scholarships/articles/green-scholarships-internships-activities>

Imposto-repagoj dank al ekologie afabla renovigo de domoj:

<https://www.redfin.com/blog/2013/09/how-to-find-tax-rebates-and-incentives-for-green-home-improvements.html>

ekologio-rilataj laborpostenoj – jen: aparte por handikapitaj homoj:

<https://www.dol.gov/odep/pdf/GreenResourceGuide.pdf>

Caroline esperas ke tiuj informoj helpas krei bonan influon al la tutmondo.

I hope these resources help others make a positive global impact of their own!

Sincerely, Caroline

Caroline Hampton

<http://openeducators.org/>

500 Westover Drive #9372 | Sanford, NC | 27330